Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 16/03/2023 Sescentdudeksesa eldono (unua eldono 20/09/2011)

Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://globalsouth.co/

Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

Esperanta Retradio

Donas bonan ĉirkaŭ-5 minutan
aŭskultadon kaj legadon ĉiun tagon
LA AVANTAĜOJ DE SVARMA INTELIGENTECO
9A DE MARTO 2023
NOTU KE NE ESTAS FACILA ELEKTI EL LA BONAJ PROGRAMOJ

Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.

Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn.

Roger Springer

La Manlia Esperanto-Klubo

La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno.
La 18a de marto estos la tria sabato. Venu ! *Roger Springer* 02 9976 6320

Interkultura Novelo-Konkurso (INK): 3-a eldono lanĉita kun nova temo kaj novaj lingvoj

La Interkultura Novelo-Konkurso (INK) revenas kun la temo ***La sekreta vivo de miaj najbaroj***. La tria eldono de la konkurso estis lanĉita de Akademio Literatura de Esperanto (ALE) kunlabore kun Bobelarto kaj aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio (UEA). La konkurso celas instigi novel-kreadon de aŭtoroj el diversaj kulturoj.

Krom la temo ***La sekreta vivo de miaj najbaroj***, du novaĵoj atendas la partoprenantojn en la ĉi jara Interkultura Novelo-Konkurso: nun eblas konkursi per **ses lingvoj** kaj estas **dek monpremioj** por gajni.

Krom Esperanto, la itala, la rusa kaj la ukraina kiuj estis akceptitaj en la dua eldono, aldoniĝas ĉi-jare la kataluna kaj la persa. Tamen tradukaĵoj el aliaj lingvoj bonvenas.

Noveloj devas esti neniam antaŭe publikigitaj. La teksto-proponoj devas havi **maksimume 2000 vortojn** (proksimume 6 paĝojn). Ne estas minimuma longeco. La konkurso permesas uzadon de artefarita intelekto (AI) por kontribui al la verkado, ties uzon oni devas mencii en la sendoformularo. Konkursi eblas per **du noveloj**.

La ĵurio konsistas el reprezentantoj de diversaj kulturoj. La gajnintoj estos anoncitaj dum la 109-a Universala Kongreso de UEA en 2024. En la komencanta kategorio, la aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos premiojn de 500, 400, 300, 200 kaj 100 eŭroj, respektive. En la sperta kategorio, la aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos premiojn de 1000, 800, 600, 400 kaj 200 eŭroj, respektive.

La limdato por konkursi estas la 30-a de septembro 2023.

Vidu ĉiujn informojn kaj detalojn pri la konkurso ĉe: bobelarto.ink/konkurso.

Kadre de la dua eldono, kies temo estis *Nokta vojaĝo*, la Interkultura Novelo-Konkurso ricevis 421 konkursantajn novelojn de partoprenantoj el 39 landoj. La ĵurio aktuale laboras pri la juĝado de la selektitaj noveloj. La gajnintoj estos anoncitaj kaj la novel-rikolto lanĉita dum la venonta 108-a UK, okazonta en Torino (29 julio-5 aŭgusto 2023). Por aliĝi al la kongreso, vizitu: uea.org/kongresoj/alighilo.

Amo, tuso kaj forpaso, la novel-rikolto de la unua eldono de la konkurso estas aĉetebla en la Libroservo de UEA kaj ĉe eldonejo KAVA-PECH.

Katja Steele

Bahaa Esperanto-Ligo 50-jara

La Bahaa Kredo, fondita de Bahá'u'lláh meze de la 19a jarcento, baziĝas sur la konvinko pri la unueco de Dio, de la religio kaj de la homaro. Ĝi havas inter siaj bazaj principoj la realigon de ĉi tiu unueco per rimedoj inkluzivantaj la adopton de universala helpa lingvo kaj i.a. ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj ties organoj pledas por tiuj principoj. Bahaanoj apartenas al preskaŭ ĉiuj etnoj kaj vivas en preskaŭ ĉiuj anguloj de la tero. Ili ĉie tra la mondo strebas krei bazdemokratajn komunumojn malfermajn por ĉiuj; tiuj formas unikan tutmondan organizaĵon surbaze de la principo de unueco en diverseco kaj tiel modelon de unuigita, paca, prospera tutmonda socio.

****

Bahaa Esperanto-Ligo, c/o Bernhard Westerhoff
Eppsteiner Str. 89, DE-65719 Hofheim-Langenhain
bel@bahai.de - https://bel.bahai.de
T. +49-(0)6192-9929-16, F. +49-(0)6192-9929-99

Katja Steele

****

3ZZZ. Krom alvoko de AEA al trapaso de KERekzamenoj la elsendo de la 13a de marto enhavas dokumentojn pri la rajto de bestoj , prezentadon de la libro de Cristina Bellini Flagoj kaj priskribon de evoluo de loka lingvo pro diversaj kialoj www.3ZZZ.com.au aŭ www.esperanto.com.au *Franciska Toubale*

La mondo estas dividita UN voĉdonis 14 dec 2022



UN General Assembly Vote on Item 20 -A/77/445 DR
Date: 14-Dec-2022
Topic: Towards a new international economic order Traduko Movu al nova internacia ekonomia ordo

THE SILICON VALLEY BANK COLLAPSE

Okazis la dua kolapso de grandega BANKO en Usono. Kiu suferos? La popolo? Laŭ la 2008 fiasko ne la bankistoj sed la impostpagantoj kaj senkulpaj ordinaraj homoj. *Roger Springer*



" Milito denove
Suferado denove,
necesas por neniu.
Tute sen kialo.
Trompado denove.
Denove stultigo kaj brutaligo de la homoj".

el artikolo de L. Tolstoi, 1904,
" Pripensu vi "

kaj jen pli nova poemo mia (*Petro Danzer*)

ESPERO POR PACO

Unu mondo,
unu Dio,
unu espero de ĉiu!

Unu homaro,
unu lingvo,
espereble baldaŭ !

Unu lumo,
unu kredo,
unu preĝo de amo !

Ni levu novan konscion
kaj petegu dian gvidon
por ke ĉiuj unuiĝu.

Ĉirkaŭ koro de homaro
iru lumo de epoko,
Ĉi tie, tie kaj ĉie.

--- *Petro Danzer* ---

Skribu pri via klubo